sub la suda kruco ★

ESPERANTO



Bonvenon al la Aŭstralia Esperanta Bonvola Kongreso Melburno, Viktorio 17-a ĝis 21a januaro, 2013.



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 20 [3] numero 111 oktobro 2012

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktoroj: Kam Lee kaj David Ryan
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

P.O. Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEA | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk2@esperanto.org.au".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15 de novembro 2012

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.


Copyright @ 2012 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj

ISSN 1038-9380.

Sur la kovrilo: Supre: Biciklistino atendas pacience apud kongresa afiŝo dum la Universala Kongreso, Hanojo, Vjetnamio.
Malsupre: Reklamo por la Aŭstralia Bonvola Kongreso 2013 en Melburno.

Sur la malantaŭa kovrilo: Memorindaj eventoj dum la Universala Kongreso en Vjetnamio.


5 Komuniko de Magistrato de Port Adelaide-Enfield



6 Vizito al Tasmanio
p 7, Andrzej Grzebowski


9 Reklamado de Esperanto: plej necese koni la ĝustan tempon …
p 11, Tutmonda Pupekspozicio


12 Alico en Mirlando


p 16, Revivigo de lingvoj…

18 La unua adelajda lingvo-festivalo


19 La kvara adelajda vintrokursaro


22 Universala Kongeso de Esperanto en Vjetnamio, impresoj, piednotoj kaj medalo


28 Memore pri Audrey


29 Gratulinda veturano

Oktobro, du mil dekdu

Antaŭparolo

En julio mi vizitis Cairns kun mia familio (ni iom panikis kiam la piloto anoncis ke nia aviadilo alvenis en 'Cans'). Ni forlasis la vintran malvarmecon de Wellington kaj alvenis al varma tropika feria loko. Unu el miaj filinoj amegas koalojn kaj la unuan tagon ni rapide vizitis koalan parkon por foti ŝin kun koalo en la brakoj. Interese, koaloj dormas 18-20 horojn ĉiutage – bela vivo, sed ne tre interesa vido por vizitantoj el foraj landoj.

Lastatempe multaj homoj en Nov-Zelando maltrankviliĝas pro la fakto ke multaj nov-zelandanoj forlasas nian landon por migri al Aŭstralio. Promenante laŭ la marbordo en Cairns sub forte brilanta suno, mi tuj komprenis kial.

Dum mi ripozis sub la suno en la plaĝo mi pensis ke, revenonte al Nov-Zelando, mi devos eklabori por prepari novan numeron de ESK. Ĉu mi devos verki artikolo(j)n por plenigi la revuon? Tamen, mi tiam pensis ke mi preferas ripozi kaj ferii kaj mi laborigos vin, miaj karaj legantoj. ESK estas via revuo kaj mi instigas vin kontribui. Ĉi tiu numero de ESK enhavas sufiĉe multajn artikolojn pri la movado kaj movadanoj (kaj mi elkore dankas tiujn kiuj kontribuis), sed mankas artikoloj pri ne-movadaj aferoj. Ne feriu en sunplena tropika paradizo – ek al verkado de artikoloj por la venonta numero de ESK!

Lasta novaĵo: Donald Broadribb forpasis la 13-an de oktobro. Nekrologo aperos en la venonta numero de ESK.

David Ryan



En parko de aŭstraliaj bestoj en Cairns (aŭ Cans)

Komuniko de Magistrato de Port Adelaide-Enfield 26-an de aprilo 2012

Antaŭeniginto de bibliotekoj ricevas Majtagan honorigon

Trevor Steele

La atingoj de antaŭeniginto kaj aktivisto de bibliotekoj (kaj esperantisto) **Arthur William Blake Mortimer** estis honorataj ĉe Majtaga ceremonio en Port Adelaide dimanĉon la 6-an de majo 2012.

La nomo de s-ro Mortimer, kiu mortis pasintjare 80-jara, estis aldonita al la historia Monumento de Laboristoj de Port Adelaide ĉe Black Diamond Corner.

Dum multaj jaroj ekde la fruaj 1970-aj s-ro Mortimer luktis diligente kaj bone por antaŭenigi bibliotekojn en la okcidentaj antaŭurboj de Adelajdo, kaj krome senpere kontribuis por persvadi ĉefministron Gough Whitlam ke li starigu la Horton-esploron pri la tre subevoluinta sistemo de publikaj bibliotekoj en Aŭstralio. La rezultoj de tiu esploro apogis agadon en ĉiuj provincoj kaj teritorioj tiel ke nuntempe preskaŭ ĉiu homo en Aŭstralio havas aliron al senpaga publika biblioteko.

"Tiusence ĉiu en Aŭstralio ŝuldas al relative malmultaj obstinaj antaŭenigantoj, inter kiuj estis Arthur Mortimer, tion kion multaj nun rigardas memkompreneblaĵo – surlokan publikan bibliotekon senpage alireblan por ĉiuj sen distingo laŭ aĝo kaj cirkonstancoj," diris Gary Johanson, la urbestro de Port Adelaide-Enfield.

En 1977 s-ro Mortimer estris "gerilan" grupon de CROW (Concerned Residents of the West - loĝantoj de la okcidentaj antaŭurboj, kiuj interesiĝas) kiu minacis pruntepreni ĉiujn haveblajn librojn en la prunta sekcio de la Ŝtata Biblioteko kaj transdoni al la libromanka regiono de Port Adelaide. La grupo ekigis longan liston de politikaj taktikoj por reveki agadon pri raporto ignorata kiu rekomendis financojn el la tutnacia registaro por publikaj bibliotekoj. En 1978 s-ro Mortimer persvadis ĉefministron de Sud-Aŭstralio, Don Dunstan, laŭtlegi al grupo de infanoj en Victoria Square (ĉefa placo). Laŭraporte, Dunstan poste diris al la konsilantaro pri bibliotekoj: "Jen, prenu $2 milionojn por viaj publikaj bibliotekoj, sed senigu min je Arthur Mortimer!"

En 1996 oni agnoskis lian laboron por evoluigi publikajn bibliotekojn en la tuta provinco per aljuĝo de Laŭmerita Premio de la Asocio de Aŭstraliaj Bibliotekoj kaj Informado. La monumento al laboristoj de Port Adelaide, unue dediĉita en 1921, agnoskas loĝantojn de Port Adelaide kiuj dediĉis sian vivon al plibonigo de komunuma vivo en la regiono kaj tiujn kiuj faris signifan kontribuon per antaŭenigo de la afero de tiulokaj laboristoj.

Arthur kaj Libby Mortimer



Vizito de esperantistoj al Tasmanio

Kam Lee

La 15an de marto, Andrzej Grzebowski kaj grupo de ses aliaj veturantaj esperantistoj el Pollando estis sur la ŝipo “Radiance of the Seas” kiu faris unutagan viziton al Hobarto, Tasmanio. Robert Budzul kaj mi renkontis ilin. Ni vidis la statuon de la fama antarkta esploristo Douglas Mawson (1882-1958). Mawson geografie kaj science esploris la parton de Antarkto kiu nomiĝas George V Land kaj Adelie Land. En 1909 lia grupo estis la unua kiu vizitis la sudan magnetan poluson.

Ni helpis la vizitantojn organizi ekskurson al la parko por sarkofiloj (Tasmanian Devil en la angla lingvo). Ili interesiĝis pri la sarkofilo ĉar ĝi estas unika interesaspekta besto en Tasmanio, kaj ankaŭ pro la ebleco de ĝia formorto pro la malsano sarkovizaĝa tumoro por kiu sanigilo ankoraŭ ne estas malkovrita.

Ni unue vizitis la Hobartan Turistinformejon. La kosto por iri aŭtobuse al la Parko tien kaj reen estis $35 por homo. Tamen, ni ne povis akiri grupan rabaton por sep homoj. Per loka scio de Robert kaj mi, ni povis mendi taksian aŭtobuson por $140. Do, sukcesa ŝparo de $10 por homo. Estas

Tasmania diablo sukcese fotita de Andrzej en la diabla parko!





Je Mawson-statuo, Hobarto. Maldekste al dekstre estas Zbigmin, Andrzej, Kam, Elzbritz, Bogumib, Alojzy, Teriza kaj Eleonora.

bone renkonti lokajn esperantistojn, ĉu ne?

Posttagmeze, Robert kaj mi rerenkontis ilin kaj ni iris al Placo Salamanca, kie lokiĝas la Tasman-fonto, kiu konsistas el fonto, statuo de Tasman, modeloj de la ŝipoj de Tasman kaj aliaj.

La fonto estis inaŭgurita de Reĝino Beatrix de Nederlando la 27-an de Oktobro 1988, kiu estis ankaŭ la ducentjara jubileo de Aŭstralio. La akva elstaraĵo estis donaco al la homoj de Tasmanio kaj organizita de “Abel Tasman” ink., kiu estas komitato de la Nederlanda Aŭstralia Societo.

Mi ĉeestis la oficialan malfermon de la fonto. Mi memoras specialajn plantojn, kies floroj aspektis tre koloraj kaj havas dikajn petalojn. Televidkompanio kaj fotistoj el Nederlando ankaŭ venis.

La Reĝino de Nederlando venis dum la ceremonio, sed mi ne sukcesis vidi ŝin, ĉar multaj homoj ĉeestis. La venontan tagon, mi povis almenaŭ vidi partojn de la ceremonio en ĵurnalo. Malgraŭ la nesukcesa

persona vido de la Nederlanda reĝino, la publika evento estis iomete speciala al mi.

Tasman naskiĝis en Lutjegast, Groningen en 1603. Li estis la unua Eŭropano por malkovri Van Diemen's Land, kiu estis poste renomita Tasmanio.

Tasmanio estis unue vidita 24-an de novembro 1642, kaj la unuaj du montoj viditaj estis nomitaj Monto de Zeehan kaj Monto de Heemskirk, kies nomoj originis el la du ŝipoj de Tasman. Tasman nomigis la insulon Van Diemen Lando, kies nomo originis el Antonio van Diemen, la guberniestro de Indonezio.

La 2-an de decembro 1642 la ŝipoj de Tasman malankris en la Golfo de Fredrick Henry. Poste membro de la maristaro naĝis al la marbordo. Flago de la Reĝido de Oranĝo estis metita sur la grundo.

La naĝanto ne vidis indiĝenojn, sed li registris indikaĵojn de ilia ĉeesto, kiel tranĉindikaĵojn en trunkoj de arboj. Rezulte de la malkovro estas la nomoj Ŝtorma Golfo, Maria Insulo, Schouten-Insulo, Maatsuyker-Insulo kaj aliaj.

Nov-Zelando, (13-a dec 1642) kaj la Tongaj Insuloj (21-a Jan 1643) kaj Fiĝiaj Insuloj estis poste malkovritaj.

Dum nia piedirado al la Hobarta Urbodomo, Andrzej diris ke la planado de la vizito komenciĝis du jarojn antaŭe kaj li volis scii kiel mi sciis pri la vizito al Aŭstralio. Mi respondis ke mi informiĝis per legado de malgranda artikolo en la e-ĵurnalo, *Aŭstralia Esperantisto*. Poste, mi povis kontakti Max Wearing kaj la edzinon de Andrzej, Regina.

Vizito al la antarkta ekspozicio en la muzeo estis memorinda travivaĵo. Ni vidis fotojn kaj restaĵojn de la unuaj antarktaj esploristoj. Ni vidis ankau tre fruan nigrablankan filmon de la natura pejzaĝo de malvarmega Antarkto.

Je la sesa de la vespero, la ŝipo forlasis Tasmanion por iri al la bela lando, Nov-Zelando.



Supre: Ĉe la statuo de nederlanda maristo, Abel Tasman (1603-1659). Tasman estas nederlanda maristo, kiu estis la unua Eŭropano por vidi Tasmanion, en 1642.

Malsupre: Foriro de la ŝipo "Radiance of the Seas" al Milford-a Fjordo, Nov-Zelando. Ie en la ŝipo estas Andrzej kaj lia grupo de vizitantoj. Mi scivolas, ĉu li rigardas tiun lokon, de kie mi fotis la ŝipon?



Andrzej Grzebowski, vojaĝema entreprenemulo eksterordinara

Max Wearing

Eĉ en la jaroj antaŭ la falo de la berlina muro en novembro 1989, Andrzej Grzebowski estis entreprenema vojaĝagento en Bydgoszcz, Pollando, kaj li jam komencis religigi landojn de la orienta kaj okcidenta blokoj.

En julio 1989, dum la Universala Kongreso en Brajtono, Anglujo, mi konatiĝis kun maljuna aŭstra esperantisto, Max Finkenzeller, unu el la fondintoj de Monda Turismo, kaj mi poste vizitis lin en lia hejm-urbego, Vieno. Tie li prezentis min al Andrzej Grzebowski, iom pli juna turismemulo, kiu tiam gvidadis aŭtobus-rondirojn kun pasaĝeroj el la orienta bloko kiuj rajtis fari vojaĝojn ekster ilia propra bloko danke al oficialaj invit-leteroj de okcidentaj landoj. Tiajn invitojn aranĝis Andrzej pro lia influo en la tutmonda Esperanto-movado, kaj tiu sukceso donis al li avantaĝon, kiu tute mankis al aliaj polaj vojaĝagentoj. Lia firmao, Esperantotur, baldaŭ organizis oftajn bus-rondirojn okcidenteniĝis Portugalujo kaj sudeniĝis Turkujo.

Kompreneble la valuto en orient-eŭropaj landoj tiam estis mizerega, kaj nur mezaĝaj mezklasaj pasaĝeroj havis la rimedojn por fari tiajn vojaĝojn. Ili devis dormi, tamen, ĉiun duan nokton en la buso, ekskursi dumtage kun la helpo de volontulaj surlokaj esperantistoj kiel ĉiĉeronoj, kaj pasigi la aliajn noktojn en malmultekostaj dorssakulejoj por duŝi sin kaj dormi en plurpersonaj dormejoj.

Por pasaĝeroj kiuj ne komprenis Esperanton, gvidantoj de Esperantotur elesperantigis la klarigojn de la ĉiĉeronoj.

Pro la sukceso de tiuj okcident-eŭropaj rondiroj, Andrzej ricevis permeson de la polaj instancoj fondi Esperanto-hotelon en Bydgoszcz kaj gastigi alilandajn turistojn. Eĉ kelkaj aŭstraliaj esperantistoj, ekzemple Trevor Steele kaj mi, iam loĝis tie. Daŭre entreprenema, Grzebowski eldonis kalendaron de E-eventoj tra la tuta mondo similan al tiuj disdonataj komence de ĉiu jaro de Esperanto kaj *Heroldo*. Esperantotur ankaŭ pligrandigis sian servadon al la Esperanta movado per la fondo de kursaroj en Budgoszcz por trejni partoprenantojn por la tutmonda turisma industrio, kaj ĝi ankaŭ enkondukis ĉirkaŭ-mondajn flugojn kaj grandŝip-krozojn - inkluzive de kelkaj kun cellokoj en Aŭstralio, Nov-Zelando, kaj aliaj urboj en la Pacifika regiono.

Andrzej plurfoje uzis dum la 1990aj jaroj, la somerkursarojn en Aŭstralio kaj la Universalan Kongreson en Adelajdo (1997) kiel bazojn por ĉirkaŭ-aŭstraliaj kaj ĉirkaŭ-mondaj vojaĝoj de alilandaj esperantistoj, tiel

Andrzej (dekstre kaj starante) kun grupo en Konstitucio-Doko, Hobarto



helpante la internaciigon de esperantistoj en Aŭstralio.

Pasintmonate mi ŝercete plendis al Andrzej pro tio ke ĉi-foje li ne kunportis al ni alilandajn esperantistojn. Mi tamen sciis ke lia respondo probable estos "Mi ne povas allogi alilandajn esperantistojn al fora lando kie Esperanto-eventoj, laŭ via propra konfeso, nun estas nur tri-tagaj aŭ eĉ unu-posttagmezaj aferaĉoj preskaŭ lastmomente anoncataj aŭ eĉ lastmomente nuligataj." Mi komprenas tian respondon.

Ju pli frue ni rekomencos okazigi en Aŭstralio pli longajn, bone planitajn, aktivajn tutlandajn eventojn frue anoncatajn en lokaj kaj tutmondaj kalendaroj kaj gazetoj, des pli frue ni povos refoje havi tutlandan Esperanto-komunumon kiu daŭre inter-rilatas kun aktiva tutmonda Esperanto-komunumo. Dum la jaroj inter la unua Aŭstralia Somerkursaro en International House en Sidnejo (2009) kaj la Jubilea Kongreso en la Universitato de Adelajdo (2012), tute mankis tiaj aranĝoj. Ni revivigu la organizadon de vivplenaj tutlandaj kursaroj kaj kongresoj frue anoncataj tra la tuta mondo! Tiam ni eble povos reallogi alilandajn grup-partoprenantojn de Esperantotur de Andrzej Grzebowski.

Reklamado de Esperanto: plej necese estas koni la ĝustan tempon agi

Etsuo Miyoshi

Estante komercisto, pri reklamado mi ja scias, sed pri reklamado de Esperanto mi bezonis investi tempon kaj monon. Mia unua sperto estis en 2002 en Danio kaj sekvis Belgio, Francio, Germanio, Italio ktp - entute 13 landoj. Ĉiam, ion novan mi lernis survoje: pli altiras konkretaĵoj, necesas laboro de grafikisto kaj reklamisto, taŭgas mallongaj tekstoj, ktp. Mia celo estas veki la amaskomunikilojn, ĉar sen ili ni ne povas esperi pri la fina venko. Konsekvenco de tio estos la konkero de la popolo, kiu siaflanke influos la politikistojn.

Post 9-foja reklamado en *Le Monde*, en junio 2010 mi negocis la aperigon de novaĵo pri lingva malegaleco. Tamen ties reprezentanto, S-ro Meixner, diris ke intereso ne estas. Tial, mi planis prelegvojaĝon al 9 francaj urboj por varbi reagantojn al la Zamenhof-taga tutpaĝa anonco. Post

Renkontiĝo de esperantistoj kun politikistoj en Lublin, Pollando



prelego en Parizo mi veturis al Vannes, kie mi subite malsanis. Mi telefonis al mia edzino: 'Mi revenos, ĉar mi ne povas spiri'. Ŝi respondis: 'la Esperanto-movado estas pli grava ol via vivo, do daŭrigu'. Sed mi ne povis teni min kaj, kiam mi alvenis Osakon, mi ne povis moviĝi.

La publiko serioze kaj sincere aŭskultis. Post apero de la reklamo mi ricevis centon da leterkopioj al *Le Monde*; verŝajne ĝi ricevis pluroble pli ol mi. Al la publika intereso, ilia respondo estis ignorado. Mi sentis ke mi staras antaŭ giganta kaj fortika muro pro desupra premordo kaj ke ili estis monavidaj... sed 'dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj'.

Kio estas la rezultoj de la agado en ĉi tiu jardeko? Inter la negativaĵoj menciendas ke en la komenco la reklamado ne sufiĉe profesiis: ne persvada enhavo, tro da tekstoj, ne konkretaj informoj, ne taŭga aspekto. Plie, mi nur unu foje reklamis en unu lando… ja ripetado estas esenca.

Kiam aperis la anonco en *Rzeczpospolita* (pola tagĵurnalo) en 2004, okazis lunĉodebato en Varsovio kun litovaj kaj polaj EU-parlamentanoj. Tiam Bronisław Geremek, EU-vicprezidanto kaj eksa ministro pri eksterlandaj aferoj en Pollando, rifuzis ĉeesti kaj private renkonti min, ĉar li konvinkiĝis ke Esperanto ne povos venki. Tamen, en majo 2008 mi sukcesis tuŝi lian koron per anonco en *Le Monde*. Tiam EU rifuzis utiligi la polan en sia retejo kaj post kunveno kun Seán Ó Riain kaj Jozef Reinvart li kunorganizis la debaton 'Esperanto, ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo?' por ĉiuj parlamentanoj la 14-an de julio. Tragike li mortis aŭtakcidente survoje al Bruselo. Li estis konvinkita ke plejparto el la EU-parlamentanoj kontraŭas la anglan dominadon kaj ke estas granda manko de scioj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto. De liaj observoj ni profitu!

La anoncoj vekis homojn kiel Isabel Castro, direktoron de Eurimages aŭ la urbestron de St-Aignan de Grand Lieu, kiuj montris intereson pri la lingvo kaj la movado. Post aperigo en *La Repubblica* en 2003, ok italaj parlamentanoj promesis al Itala E-Federacio proponi la utiligon de Esperanto en la Eŭropa Komisiono. Unu el ili, Emerenzio Barbieri, dum la nuna parlamenta mandato prezentis leĝproponon pri nia lingvo.

Ĉu ankoraŭ mencii ke la hejmpaĝoj de la landaj asocioj en la anonclandoj estis pli vizitataj sekve de la reklamoj? Aŭ ke pliaj lernantoj aperis en la kursoj? La slovaka diplomato Josef Reinvart sendis kopiojn de la aperaĵo en *SME* (slovaka tagĵurnalo) en 2004 al ĉiuj slovakaj ambasadorejoj tra la mondo kaj oficistoj de la ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Ĉu reklami estas vana elspezo? Certe ne, sed investo en la estonteco ĉar, se EU agnoskos Esperanton, la mondo tuj sekvos.

Esperanto estas varo same kiel Coca-Cola, McDonald's, ktp. Se ni ripete montras la solvon al la nuna

Etsuo Miyoshi kaj Atilio Orellana Rojas ĉe Kansai Internacia Flughaveno kaj preparante sian veturon al Pollando



lingva malegaleco, ni havos la ŝancon sukcesi, ekzemple per samtaga reklamado dum unu jaro ĉiumonate en la 27 EU-landoj. Nun oni simple cedas antaŭ la ĝeneraliĝo de la angla. Nia misio estas veki la homaron de tiom vasta soporo, imitante Ludovikon. Mi pensas, ke tia senprecedenca agado povus utili kiel brulŝnuro. Ni ne perdos ĉion. Certe io sekvos. Ni bezonas investi por sukcesi. Ĉiu organizo kaj kompanio progresas aŭ regresas. Ne ekzistas horizontala flugo.

Ĉi tiu kampanjo okazu kadre de pli vasta strategio, kiu inkluzivu ekzemple, ke landaj asocioj konigu la reklamojn al siaj landaj kaj EU-parlamentanoj, varbado de kursanoj, aŭ aliaj agadoj laŭ la landaj kondiĉoj. Ankaŭ tio altiros la amaskomunikilojn kaj Esperantujo vigliĝos.

Mia unua reklamo kostis pli ol EUR 70.000 kaj la prezo trioniĝis kondiĉe de 10-foja ripeto. La nunaj monrimedoj de UEA larĝe sufiĉas por tio. Kion la esperantistaro opinias?

En Gdansk, Etsuo kaj aliaj staras apud parto de la aŭtentika Berlina Muro. “Mi preĝas, ke la lingva muro falu same kiel la Berlina.”- Etsuo



S-ro Miyoshi raportas ankaŭ pri:

Tutmonda Pupekspozicio

De la 29a de septembro ĝis la 8a de oktobro 2012 okazos en Higashikagawa (insulo Ŝikoku, Japanio), la 2-a Monda Pupekspozicio. Tiam estos eksponataj ĉirkaŭ 800 pupoj el 40 landoj el Afriko, Azio, Mezeŭropo kaj Sudameriko.

Kiel jam tradicie, la pupoj estos prezentataj en laŭlandaj standoj kun tre riĉaj informoj pri historio, rilatoj inter Japanio kaj la landoj de la pupoj, pupistoj, mapoj, puplibroj, ekzotikaj bongustaĵoj kaj ilia landa muziko.

Higashikagawa estas konata kiel Pupurbo. Ĝi kalkulas je prestiĝa pupteatrejo kaj ĉiujare en marto kaj oktobro okazigas pupfestivalojn. Tiu de marto estas Hinamatsuri, kiam ĉirkaŭ cent loĝejoj montras tradiciajn japanajn pupojn en siaj fenestroj. La puparo eksponata en oktobro venas el eksterlando kaj estas Esperanto-parolantoj kiuj helpas ampleksigi la kolekton.


Etsuo kaj esperantistoj en Bialystok



Alico en Mirlando: intervjuo kun Donald Broadribb

Kam Lee

Mi informiĝis pri la libro tradukita de Donald en aprilo kaj mi decidis intervjui lin per kelkaj leteroj kiuj havis demandojn. La originala libro estis verkita de la angla aŭtoro, Charles Lutwidge Dodgson, sub la pseŭdonimo Lewis Carol. La unua eldono de la libro estis presita en 1865 kaj la unuaj entuziasmaj legantoj inkluzivis la Reĝinon Viktoria kaj Oscar Wilde. Poste okazis presitaj tradukoj de la libro en la germanan (1865), francan (1865), svedan (1870), italan (1872) kaj tiel plu. En 1907, la kopirajto de la libro eksvalidiĝis kaj la libro iĝis publika havaĵo. La libro estas tradukita en almenaŭ 97 lingvojn. Jen komenciĝas la intervjuo:



Kovrila paĝo de la nova traduko de Donald Broadribb

1) Kiam vi komencis kaj finis la tradukon?

En la jaro 1996 miaj okuloj estis operaciataj pro kataraktoj, kaj dum kelkaj semajnoj mia vidpovo estis tre limigita. Do dum mi sidis en fotelo en mia hejmo, mi decidis distri min per tradukado de ***Alico en Mirlando****. Mi finis la unuan version de la traduko malfrue en tiu jaro. Post tiam, mi plurfoje reviziis ĝin.*


2) Kial vi elektis ĉi tiun libron?

Jam de mia infaneco mi amis la verkon, kaj ĉiujare mi relegis ĝin. Ĝi ja estas unu el la ĉef-verkoj de la anglalingva literaturo kaj tutmonde amata.

3) Ĉu estas kelkaj partoj de la libro, kiujn vi pli ĝoje deziris traduki?

Nu, malfacilas elekti; sed mi supozas ke kelkaj ĉapitroj tre vigligis mian tradukemon. Ĉapitro 9 "La rakonto de la falsĥelonio" ne nur multe amuzas min, sed ankaŭ provizas al mi tre malfacilajn poezitradukendaĵojn.

La farblaboro farita de ĉi tiuj karakteroj estas neniam finita en ĉi tiu regnlando!



4) Kio viaopinie estas la plej malfacila aspekto de la traduko de la verko?

La decido ĉu la verko specife celis infanojn kaj, se jes, kiajn piednotojn oni enmetu por klarigi al la infano (kaj, efektive, ankaŭ al la plenkreskaj legantoj) la aludojn kiujn la aŭtoro supozis seneksplike kompreneblaj.

5) Ĉu vi opinias, ke estas helpe informiĝi pri la aŭtoro antaŭ ol komenci la tradukon?

Nu, jes, ĉar ju pli oni scias pri la aŭtoro, des pli oni povas kompreni ties celon esprimitan aŭ proponitan en la verko. Ankaŭ helpas la tradukanton scii kiaj antaŭjuĝoj, spertoj, kredoj, supozoj, hobioj, kc. plenigas la menson de la verkinto.

6) Vi elektis la ĉi-kunan parton de la traduko por esti presita en ESK. Kial?

Ĝi montras la stilon de Lewis Carroll kaj lian satiran humuron.

7) Ĉu vi deziras komenti pri kiel vi renkontis kaj kunlaboris kun la desegnisto John Tenniel?

John Tenniel mortis en 1914; tial, mi neniam renkontis lin. La bildoj en la tradukita libro estas skanitaj el la originaj desegnaĵoj preparitaj por la unua eldono de Alice in Wonderland (1865).

(La originaj desegnaĵoj estis nigraj kaj blankaj, kaj estis koloritaj en ĉi tiu artikolo.)

8) Ĉu vi intencas aŭ jam tradukis poemojn aŭ teatraĵojn?

Kelkaj poemtradukoj estis eldonitaj en la iama Biblia Revuo*, kaj en la libro redaktita de William Auld,* Nova Esperanta Krestomatio, *estas longa traduko mia de antikva poemo. Teatraĵojn mi neniam tradukis, kaj verŝajne ne tradukos. En la baldaŭ aperonta* Trans la Spegulo, *ankaŭ de Lewis Carroll, troviĝas pluraj aliaj poemtradukoj miaj.*

9) Ĉu vi deziras rekomendi ion al iu, kiu deziras traduki rakonton?

Nur ke tion faru eksperta esperantisto, kiu scias pli malpli perfekte la gramatikon de Esperanto,



Dum tefesto. Verŝajne Alico estas iomete malkontenta pri io. Ne estas surprizo, ke la "Freneza Ĉapelisto" povas diri agacigeman komenton, ĉu ne?

kaj kiu tre bone konas la verkon tradukotan.

Mi dankas vin pro la intervjuo, kaj ĉu vi deziras aldoni aliajn komentojn?


Multaj librotradukoj miaj troveblas en PDF-formo per Interreto. Ĉe la URL http://i-espero.info/files/elibroj/ troviĝas miaj tradukoj de tri libroj de Lewis Carroll, 12 libroj de L Frank Baum, mia traduko de 1984 de George Orwell, Eposoj el Antikva Ugarito,kaj Du verkoj de Platono: La Respubliko kaj Kratilo.

Ekzempla parto el la tradukita verko:

La Reĝo kaj Reĝino de Keroj sidis sur sia trono kiam ili alvenis, kaj granda amaso da uloj ĉirkaŭis ilin—ĉiaj malgrandaj birdoj kaj bestoj, kaj ankaŭ la tuta kartaro: la Bubo staris antaŭ ili, ĉenite, kaj ĉiuflanke de li estis soldato gardanta lin; kaj proksime al la Reĝo estis la Blanka Kuniklo, kun trumpeto en unu mano, kaj pergamena rulaĵo en la alia. En la mezo mem de la kortego estis tablo, sur kiu estis granda telero da tortetoj: ili estis tiom allogaj ke rigardo al ili malsatigis Alicon—"Ili rapidu fini la proceson," ŝi pensis, "kaj disdonu la manĝaĵojn!" Sed ŝajne tio ne okazos; do ŝi komencis ĉirkaŭrigardi ĉion por pasigi la tempon.

Alico neniam antaŭe estis en tribunalejo, sed ŝi legis pri ili en libroj, kaj ŝin plezurigis ke ŝi scias la nomon de preskaŭ ĉio tie. "Jen la juĝisto," ŝi diris al si, "pro lia granda peruko."

Efektive, la juĝisto estis la Reĝo; kaj, ĉar lia krono estis sur lia peruko (rigardu la antaŭbildon se vi volas vidi kiel li faris tion), li aspektis tute ne komforta, kaj certe ĝi ne beligis lin.



Fanfarona advokato de leĝa afero en la kortumo. La reĝo, reĝino, aŭdantaro kaj la kortumaj oficistoj analize aŭskultas. Kiu fakte ŝtelis la tortetojn de la Reĝino de Koroj?

"Kaj jen la ĵuriejo," pensis Alico, "kaj tiuj dek du uloj," (ŝi devis diri "uloj", komprenu, ĉar kelkaj el ili estis bestoj, kaj kelkaj estis birdoj), "mi supozas ke ili estas la ĵurio. Ŝi diris ĉi tiun vorton al si du- aŭ tri-foje, kaj iom fieris pro ĝi: ĉar ŝi opiniis, tute prave, ke tre malmultaj knabinetoj ŝiaaĝaj scias ĝian signifon. Tamen, "juĝantoj" tute sufiĉus.

La dek du ĵurianoj ĉiuj okupis

sin per skribado sur ardezojn. “Kion ili faras?” Alico flustris al la Grifo. “Ankoraŭ estas nenio skribinda, ĉar la proceso ankoraŭ ne komenciĝis.”

“Ili skribas siajn nomojn,” la Grifo flustris responde, “por ne forgesi ilin antaŭ la fino de la proceso.”

“Stultuloj!” Alico komencis per laŭta indigna voĉo, sed ŝi eksilentis haste, ĉar la Blanka Kuniklo kriis, “Silentu en la kortego!” kaj la Reĝo surmetis siajn okulvitrojn kaj maltrankvile ĉirkaŭrigardis por trovi kiu parolas.

Alico povis vidi, egale bone kiel se ŝi transrigardus iliajn ŝultrojn, ke ĉiuj ĵurianoj skribas “Stultuloj!” sur siajn ardezojn, kaj ŝi eĉ povis rimarki ke unu el ili ne scias literumi “stult-”, kaj ke li devis peti helpon de sia apudulo. “Bele malordaj estos iliaj ardezoj, ĝis la fino de la proceso!” pensis Alico.

Unu el la ĵurianoj havis krajonon grincantan. Tion, kompreneble, Alico ne povis toleri, kaj ŝi iris ĉirkaŭ la tribunalon kaj ekstaris malantaŭ li, kaj tre baldaŭ ŝi trovis oportunon forpreni ĝin. Ŝi faris tion tiom rapide ke la kompatinda ĵurianeto (Vilĉjo, la Lacerto) tute ne povis kompreni kio okazis; do vane serĉinte ĝin, li devis skribi per fingro dum la resto de la tago; kaj tio malmulte utilis, ĉar ĝi ne lasis signojn sur la ardezo.

“Heroldo, legu la akuzon!” diris la Reĝo.

Je tio la Blanka Kuniklo trifoje sonigis la trumpeton, poste malrulis la pergamenan rulaĵon, kaj legis ĉi tion:—

Reĝino Kera dum tag’ somera

Tortaron faris ŝi:

Kaj Bubo Kera dum tag’ somera

Li ŝtelis tortojn, li’!

“Decidu vian verdikton,” la Reĝo diris al la ĵurio.

“Ankoraŭ ne! Ankoraŭ ne!” la Kuniklo haste interrompis. “Multo devos okazi antaŭ tio!”

“Alvoku la unuan atestanton,” diris la Reĝo; kaj la Blanka Kuniklo trifoje sonigis la trumpeton kaj kriis, “Unua atestanto!”

La unua atestanto estis la Ĉapelisto. Li venis tenante tetason per unu mano kaj iom da pano-kun-butero per la alia. “Pardonu, via Moŝto,” li komencis, “ke mi enportis ĉi tion; sed mi ne jam plenfinis mian tepaŭzon kiam oni alvokis min.”

“Vi devus esti fininta,” diris la Reĝo. “Kiam vi komencis?”

La Ĉapelisto rigardis la Martan Leporon, kiu lin sekvis en la kortegon, brak’-en- brake kun la Gliro. “La dek-kvaran de marto, mi kredas memori,” li diris.

“La dek-kvinan,” diris la Marta Leporo.

“La dek-sesan,” diris la Gliro.

“Notu tion,” la Reĝo diris al la ĵurio, kaj la ĵurio fervore skribis ĉiujn tri datojn sur siajn ardezojn, kaj poste adiciis ilin kaj konvertis la respondon al ŝilingoj kaj pencoj.



Revivigo de lingvoj kaj la kontribuo de Esperanto

Jen prelego de Ghil'ad Zuckermann dum la malferma ceremonio de la Esperanto-ekspozicio en la Migra Muzeo de Adelajdo, la 11-an de septembro 2011.

Gesinjoroj,

Mia nomo estas Ghil'ad Zuckermann, mi estas el Israelo, kaj mi estas profesoro de la fako reviviga lingvistiko. Eble vi demandas vin kial mi inaŭguras ekspozicion de Esperanto. Kiel Esperanto rilatas al revivigo de aliaj lingvoj? Pri tio mi parolos iom poste. Unue iom pri mia propra fako.

Reviviga lingvistiko studas lingvojn kiujn oni revivigis post ilia fakta aŭ ŝajna morto, kaj aliajn lingvojn kiuj estas mortantaj. La plej sukcesa ekzemplo de revivigita lingvo estas la moderna hebrea kiun mi preferas nomi la israela. La nuna israela multrilate ne estas la formo kiun ben Yehuda kaj la aliaj pioniroj celis. Ĝi estas fakte hibrida lingvo kun la antikva hebrea kaj la jida kiel bazoj. Sed neniu povas nei ke la projekto krei modernan komunan lingvon por la judoj loĝantaj en Palestino estis granda sukceso.

Nun mi laboros en Adelajdo kaj mi esperas apliki lecionojn kiujn oni lernis en la rekreado de la israela, al aliaj lingvoj revivigotaj, ekzemple la kaurna kaj aliaj aborigenaj lingvoj de Aŭstralio.

Mia fako estas relative nova, kaj des pli interesa, kaj mi antaŭĝuas kunlabori kun aliaj lingvistoj en Aŭstralio.

Sed nun mi revenu al la unua demando: kiel tio rilatas al Esperanto? Esperanto, kiel vi scias, celas doni al ĉiu homo komunan duan lingvon relative facile lerneblan pro sia reguleco. Sed estas evidente ke la kreinto de Esperanto – Zamenhof, kiu cetere estis ankaŭ judo – vidis sian lingvon kiel nur la unuan paŝon al kreo de pli humana, pli kunlaborema, pli amika homaro. Alivorte, Esperanto havas propran ideologion, ĝi estas pli ol lingvo. Ĝiaj uzantoj vidas en ĝi la lingvan elementon de la batalo por pli bona mondo.

Kaj inter la celoj de tiu agado estas konservado de malgrandaj lingvoj. Onidire estas ankoraŭ proksimume 6 000 lingvoj en la mondo, sed ĉiun duan semajnon unu el ili mortas.

Kial lingvoj mortas? Eble iliaj parolantoj mortas aŭ estas mortigitaj. Aŭ eble ili mortas pro tio ke pli grandaj lingvoj mortigas ilin. Ekzemple, en Afriko la lingvo de edukado estas kutime iu eŭropa lingvo, la lingvo de la iamaj koloniaj mastroj: la franca, la angla, la portugala, kaj tiel plu. Se infanoj ricevas la impreson ke la lingvo de la gepatroj estas duaklasa, senprestiĝa, ke ĝi ne havas literaturon, estas kompreneble ke post ne tre longe tiu gepatra lingvo iĝos nur hejma ĵargono, pri kiu oni eble iom hontas. Povas esti ke post unu plua generacio la senprestiĝa lingvo estas tute forgesita.

Tio signifas ke en la nuna mondo daŭre okazas la fenomeno de lingvocido. Ĉu tio estas problemo? Ĉiufoje kiam lingvo mortas, mortas ankaŭ homaj spertoj kaj konoj nesaveble. Ni volas konservi best- kaj plantspeciojn. Kial ni ne konservu homajn lingvojn? Sed ŝajnas ke la tendenco – lingvocido – estas nehaltigebla.

Esperantistoj konscias pri tiu fenomeno kaj asertas ke sia lingvo kontribuos al konservado de endanĝerigataj lingvoj. Kial Esperanto, se ĝi iĝus tutmonda dua lingvo, ne same mortigos aliajn lingvojn kiel aktuale la hispana, rusa, angla, kaj tiel plu? Esperantistoj havas respondon al tiu demando: ilia lingvo diferencas en tre grava maniero de ĉiuj naciaj lingvoj, ke ĝia ekzistokialo estas plenumi altruisman celon. Ĉiuj esperantistoj estas almenaŭ dulingvaj kaj tre konsciaj pri la problemo de neegaleco en la nuna lingva strukturo de la mondo. Ni ne forgesu ke granda parto de la homaro parolas hejme lingvon alian ol la nacian. esperantistoj konsilas: hejme uzu vian hejman lingvon, en nacia kadro uzu vian nacian lingvon, en internaciaj rilatoj uzu Esperanton.

Do, esperantistoj kaj ni homoj, kiuj zorgas pri lingva revivigo, estas potenciale alianculoj: ni povas helpi unu la alian.

Ankaŭ praktike esperantistoj povas doni gvidadon al ni kiuj luktas por rekonstrui lingvojn. Kiel en la ekzemplo de la hebrea, ne eblas simple revivigi lingvon ekzakte tia, kia ĝi estis. Necesas elpensi multajn novajn vortojn por la moderna vivo kiujn la mortinta lingvo ne havis. Foje necesas eĉ draste modifi lingvostrukturojn. Esperanto estis antaŭ nelonge lingva projekto, kaj ĝiaj uzantoj devis evoluigi la vortstokon en maniero plej efika por homoj el ĉiuj lingvoregionoj. Necesis krei vortarojn por la sciencoj, la komerca vivo, filozofio, sporto, literaturo, religio, kaj tiel plu. Mi kredas ke ni revivigantoj povas multon lerni el la sistema laboro de esperantistoj, kaj eble esperantistoj povas ion lerni de niaj laboroj.

La ekspozicio antaŭ vi montras diversajn aspektojn de la originoj kaj evoluo de Esperanto. Sur pli persona nivelo ĝi montras kelkajn enmigrintojn al Sud-Aŭstralio kiuj profitis de sia esperantisteco: aliaj esperantistoj jam vivantaj ĉi tie helpis la novulojn trovi laboron aŭ loĝlokon aŭ asimilĝi en la nova lando. Homoj dum la tuta historio migradis pro diversaj kialoj: imagu la avantaĝojn por migrantoj se ĉie en la mondo oni parolus komunan duan lingvon!

Fine, ne ĉio pri Esperanto estas solena kaj serioza - oni povas ankaŭ ŝerci en la lingvo. Ĉu vi aŭdis pri la franco, la germano, kaj la judo kiuj ĉiuj suferis je laceco kaj soifo?

La franco diris: “Mi estas laca kaj soifa – mi devas havi vinon!”

La germano diris: “Mi estas laca kaj soifa – mi devas havi bieron!”

La judo pripensis kaj diris: “Mi estas laca kaj soifa – mi devas havi diabeton ...”

Gesinjoroj, kun plezuro mi inaŭguras ĉi tiun Esperanto-ekspozicion.

La unua adelajda lingvo-festivalo

Katja Steele

En Esperanto-revuoj legeblas raportoj pri sukcesaj lingvaj festivaloj en pluraj landoj de la mondo. Antaŭ nur kelkaj jaroj en Torquay (Novsudkimrio) okazis la unua aŭstralia lingva festivalo, kaj ĉi-jare Dima Lushnikov organizis tian festivalon en Sidnejo. La unuan adelajdan festivalon entreprenis organizi en sia laborloko Sandor Horvath. Thebarton Senior College havas proksimume 1 000 studentojn, precipe enmigrintojn kaj rifuĝintojn. Tial taŭgis elekti la 20-an de junio, la Internacian Tagon de Rifuĝintoj, por organizi eventon en kiu unuopaj studentoj de la lernejo prezentis sian propran lingvon.

Estis granda laboro konvinki la junulojn fari la prezentaĵojn, fari afiŝojn kun iliaj fotoj kaj nomoj, montri al ili kion la 30-minutaj prezentadoj enhavu, kiel utiligi la komputilon ktp. Por tio ĉio Sandor ruze uzis la ekzemplon de Esperanto. Tiel jam antaŭ la evento amaso da studentoj aŭdis pri nia lingvo.

La prezentadon de Esperanto faris Jamal Mazraeh, studento (kaj de la angla kaj de Esperanto) de Sandor. Apud li staris kaj aldonis kelkajn subtenajn vortojn Sibel Lewis kiu ĝis nun nur malmulton scias pri la lingvo, sed tre apogas la ideon de Esperanto. La parolitajn informojn resumis bone preparitaj tekstoj projekciitaj pere de komputilo kaj unupaĝa informfolio.

Sufiĉe multaj aŭskultis la E-prezentaĵon kaj evidente bone kaptis la principojn de la lingvo.




Maldekstre al dekstre estas unu el la studentinoj de la kolegio, Ghil'ad Zuckermann, kaj Sandor Horvath.

Mallongan malferman paroladon pri la graveco de lingvoj havis Ghil'ad Zuckermann, profesoro de la fako "reviviga lingvistiko", kiu pasintjare jam kunlaboris kun la adelajdaj esperantistoj dum la Jubilea Kongreso de AEA kaj ĉe la lanĉo de la E-ekspozicio.

Dudek kvin lingvoj estis prezentitaj – impona nombro por la unua provo. Ne ĉio funkciis perfekte, sed la rezulto estis tamen tre pozitiva. Sandor faris tre bonan laboron, el kiu profitis kaj la studentoj de la kolegio, kaj Thebarton Senior College kaj certe ankaŭ Esperanto.

Jamal Mazraeh vigle prezentas enkondukon pri Esperanto al interesita aŭdantaro.



La kvara adelajda vintrokursaro

Katja Steele

En 2005 Sandor Horvath diris ke estas tro longa periodo de nelernado, se ni atendas nur la tradiciajn somerlernejojn por partopreni kursojn. Kial ne havi ankaŭ vintran kursaron? Li mendis ejojn en sia loka komunumejo en Clarence Park (Adelajdo), elektis la longan semajnfinon de la reĝina naskiĝtagdatreveno – kaj la esperantistoj venis, eĉ kelkaj komencantoj.

En 2006 reprenis la ideon pri vintrokursaro Gordon Coleman, tiutempe instruisto en lernejo Hackham. Li instruis Esperanton al siaj lernantoj kadre de normalaj instruhoroj kaj ricevis permeson okazigi en la lernejo ankaŭ la 3-tagan kursaron por plenkreskuloj.

Ankaŭ la trian kursaron organizis Gordon (2011), sed tiun jam en sia nova laborloko: lernejo Sheidow Park. Samloke okazis la kvara, ĉi-jara kursaro. Denove estis longa semajnfino (la 9 -11-a de junio) kaj ni kunvenis en la negranda sed tre agrabla kaj bone ekipita lernejo. Matene okazis du-parta instruado en 3 niveloj. La komencantojn instruis Brodie May, juna studento pri lingvoj, la mezan nivelon Sandor Horvath kaj la trian grupon Trevor Steele. Ann, la edzino de Gordon, preparis por la

lunĉo varman supon kun pano; libere preneblis kafo-teo. La unuan posttagmezon Katja Steele montris kiel uzi la Mazi-filmon por instrui Esperanton al infanoj, kaj Gordon vidigis al la ĉeestantoj Esperanto-fabelojn, haveblajn en la reto. La duan posttagmezon Jenny kaj Alan Bishop prezentis la projekton Ekparoli ĉe la Universitato Monash en 1993-97. Tiu projekto estis grava atingo, kaj la publiko ne sciis pri la diversaj malfacilaĵoj, kiujn necesis alfronti. La reston de la tago ni dediĉis al la diskutado pri AEA kaj la celoj de la kandidatoj por la estraro de AEA. La trian tagon ni kolektiĝis ne multaj, sed pasigis agrablan tempon kantante Esperanto-kantojn kun pian-akompanado de Alan Bishop.

La kursojn partoprenis 19 personoj, kelkaj el ili nur portempe. Ni ĝojis havi la Bishop-ojn el Viktorio kaj la junan komencanton Remi el Francio. Lin kaj la turkan Sibal varbis Sandor. La plej juna partoprenanto estis Eddie Desailly, la plej 'matura' Bob Felby – baldaŭ 80-jariĝonta. Estis agrable vidi pliajn junulojn: Lilin Chen kaj Brodie May, ambaŭ tre talentajn.

Mi kunportis malgrandan libroservon. Parto de ĝi estas libroj kaj brokantaĵoj de la adelajda klubo, parto varoj aĉetitaj de mi mem. La vendoj de la

Grupo de partoprenantoj de la Vintra Kursaro en Adelajdo, Sudaŭstralio



vintrokursaro valoris pli ol 270 dolarojn, kio montras ke intereso pri en la manon preneblaj libroj restas. Okazigi libroservon indas kaj necesas.

Alia konkludo de la kursaro povus esti ke ĝia tria tago verŝajne ellaseblas - jam 'tradicie' nemultaj venadas al ĝi. Lernejo kiel okazejo montriĝis tre bona ideo. Ni ĉiam havis je nia dispono apartajn ejojn por la 3 niveloj, bonan kunvenejon, komputilojn, printilojn... Gordon ĉi-foje eĉ la fotojn pri la aranĝo tuj printis por ni, havigis pianon por la kantado, multobligis diversajn tekstojn. Menciindas ke li ankaŭ en tiu ĉi lernejo instruas Esperanton (la partoprenantoj de la pasintjara Jubilea Kongreso povis renkonti kelkajn el liaj lernantoj) kaj ke la direktorino de Sheidow Park kaj pasintjare kaj nun venis renkonti nin. Nia ĉeesto subtenis la poresperantan laboron de Gordon en la lernejo,same kiel vizitoj de Sandor kaj liaj plenkreskaj studentoj aŭ la pasintjara koncerto de Jomo en la lernejo.

Kian sencon havis la kursaro? Kelkaj eklernis la lingvon, kelkaj plibonigis siajn jamajn sciojn. Tiuj, kiuj nur nelonge lernas Esperanton havis eblon renkonti esperantistojn kaj Esperanto-komunumon, kaj sperti la vivantan lingvon. Ni ĉiuj interŝanĝis diversajn ideojn, lernis pri organizado, instruado. Kaj ege gravas ke ni ja volis kunesti, amikiĝi. Gordon kiel organizanto meritas multajn dankojn. Ni esperu ke venontjare ni ree kursumos ĉe li.



Brendan Linnane kaj Paul Desailly diligente provas solvi la krucvortenigmon.



Max Wearing kaj Alan Bishop



Jenny Bishop kaj Carol Linnane laboris en duopo.



Eddie Desailly tute ne enuis.

Impresoj de la Universala Kongreso de Esperanto en Vjetnamio

Sandor Horvath

Mi ĵus revenis de la Hanoja Universala Kongreso. Mi decidis tuj surpaperigi kelkajn impresojn, sentojn, kaj pensojn antaŭ ol ili malaperas en la mallumo de la historio.

* Mi neniam vidis tiom da motorcikloj. Je la komenco mi timis ilin, sed finfine mi eĉ prenis motorciklan taksion …. kaj fakte ĝuis la vojaĝojn, sidante malantaŭ la ŝoforo.

* La loka kongresa komitato sukcesis havigi multajn flagojn kaj banderolojn tra la tuta urbo. En la Kongresa Kuriero oni parolis pri 1 000. Ili vere sukcesis videbligi la kongreson.



Sandor estas motorbicikla pasaĝero en aventurema ekskurso en Hanojo. Memoriga momento, ĉu ne!?

Manĝtempo kun aliaj esperantistoj dum la Hanoja kongreso. Estas bonvena tempo por vigle babili kun samideanoj kaj ricevi utilan informon, ĉu ne!?



* Bedaŭrinde la nombro de partoprenantoj estis nur iomete malpli ol 900. Kompreneble tio estis nekontentiga.

* Partoprenis 13 aŭstralianoj kaj unu novzelandano.

- Jonathan Cooper prezentis brilan, interesan, kaj pensigan prelegon pri 'moderna arto'. Petu lin ripeti ĝin por vi aŭ via grupo.

- Trevor Steele prelegis pri la tasmaniaj aborigenoj. Ankaŭ petu lin, aŭ aĉetu lian libron "Paradise Stolen".

- Jenny Bishop prezentis la projekton de Penny Vos.

- Penny mem iĝis estrarano de ILEI dum la ILEI-a kongreso dum la antaŭa semajno. Ni gratulas ŝin.

* Mi estis pozitive surprizita vidi Marcel, lian filon Robert, kaj ankaŭ lian nepon; do, tri generacioj. Mi sukcesis konvinki mian filinon, Petra, partopreni la kongreson kaj ŝi komencis lerni en la klaso de Katalin Kovacs.



Ĝoja momento en Halong-Golfo



Tri feliĉaj turistoj en ekskurso



Tri generacioj de la Leereveld-familio

Malsupren: Ekskurso tra bela Halong-Golfo, Vjetnamo





Grupfoto de la organizantoj de la Hanoja Universala Kongreso dum la ferma ceremonio

* Vere tuŝis min la entuziasmo de la vjetnamaj gejunuloj.

* La ekskurso al Halong estis turisma, sed ne tiel kiel mi anticipis.

* Partoprenis 14 personoj el Indonezio (pli ol el Aŭstralio!!!). Estis bonega novaĵo aŭdi kaj legi ke Esperanto vere evoluas. Krome, ili prezentis belegan dancon dum la internacia vespero. Eble iam ankaŭ aŭstralianoj povus prezenti ion? Konsideru partopreni en la unua Esperanto-Kongreso en Indonezio venontjare (19 – 22 aprilo 2013) en Bandung (https://sites.google.com/site/iek2013bandung). Ankaŭ la malnova ideo starigi unu el niaj somerkursaroj en Indonezio estis diskutita. Kion **vi** pensas pri tio?

* Mi tre ĝuis aŭdi pri diversaj sukcesaj agadoj tra la mondo. Tiuj raportoj vere donas al mi energion kaj iom da entuziasmo. La urbeto de Mazara del Vallo en Sicilio 'adoptis' Esperanton kaj nun ĝi estas instruata en la lernejoj de la urbeto. (Legu pli en la revuo *Esperanto,* marto 2012.) Ĉu eble ekzistas simila loko en Aŭstralio?

Hieraŭ mia filino Petra diris al mi ke ŝi ne kredis antaŭe ke Esperanto vere funkcias, sed nun ŝi scias ke ĝi funkcias. La Universla Kongreso estas nia plej granda kaj varia evento kaj tiu kongreso, same kiel la ses kiujn mi ĉeestis, plezurigis, revigligis kaj donis entuziasmon. Se vi havas tempon, rimedon, kaj energion partoprenu la Universalan Kongreson en 2013 en Reykjavik, 2014 en Buenos Aires, kaj en 2015 la 100-a Universala Kongreso okazos verŝajne en Francio.

Kelkaj piednotoj pri la kongreso

Trevor Steele

Ĉeestis probable la plej malalta nombro en la periodo post la Dua Mondmilito. Kialoj? Unue, mi suspektas, la financaj problemoj de eŭropanoj, kiuj kutime estas la plimulto ĉe iu ajn kongreso. Due, la timata vetero: ŝvitado neevitebla. Mi mem malsaniĝis, bonŝance ne dum la UK mem sed dum la postkongresa ekskurso. Tria kialo kiun oni ne tro laŭte konfesu: ni estas aktuale pliaĝiĝanta homgrupo, kaj aldonaj jaroj ne pligrandigas la vojaĝemon. Kontraste kun tio: la vjetnamoj estis grandparte junaj, gestudentoj, kaj kelkaj povus esti iam gravaj movadanoj.

Alia bonaĵo: la vjetnama ŝtato evidente klopodigis sin por helpi nin.



Antaŭ hotelo Melia Hanoi: Katja, Nancy, Trevor kaj Jonathan



La kongreso ĵus finiĝis: Petra, Katja, kaj Trevor

Malsupre: Post la vespera programo kun loka organizantino kaj aŭstraliaj esperantistoj



La urba akcepto estis probable la plej luksa ĝis nun: abunda kaj bonkvalita manĝo kaj altklasaj muzikaj prezentaĵoj kaj multekosta donaco de luksa libro kaj vazo al ĉiu gasto. Diversokaze ni ĝuis spektaklojn de dancado kaj kantado, kaj sendube la prezentantoj estis la elito de la lando. Cetere, nenie ni vidis eĉ unu vere dikan homon. Sendube tio ligiĝas al alia konstato: nenie ni vidis McDonald's, Burger King, Kentucky Fried Chicken ktp.

Ĉiama problemo de kongresoj: samtempe okazis kvar-kvin prelegoj aŭ kunsidoj, kiujn oni volonte ĉeestus. Solvo ne videblas, sed tio ne estas problemo nur de esperantistoj.

Ofte oni sin demandas ĉu la tradicia formo de kongreso estas ankoraŭ efika. Sed unu bonaĵo estas eksterduba: ĉe kongreso oni renkontas karajn homojn, kunbatalantojn por la bona afero. Dum 51 semajnoj jare ni esperantistoj estas eta minoritato en granda mondo: dum unu semajno ni devas nenion pruvi al skeptikuloj: ni estas samideanoj inter ni. Kaj tio donas energion por la venontaj 51 semajnoj!



Jonathan respondas al demandoj de la publiko. La temo de lia prelego estas pri moderna arto.

Adiaŭ ĉe la kongresejo. Malantaŭa vico maldekstre al dekstre: Dimitri , Trevor, Katja, Alan, Robert, Antaŭa vico maldekstre al dekstre: Petra, Sandor, Marcel, kaj Heather





Bradley el Nov-Zelando, eleganta dum la bankedo ĉe la urbestro de Hanojo



Tagmeze en la enirhalo de la kongresejo: Franciska, Heather, Ivan, Katja kaj Alan

Medalo por Franciska Toubale

En 1999 Franciska gastigis esperantistojn el Vjetnamio post la somera kurso en Melburno. Poste ŝi ĉeestis la 2-an Azian Kongreson kaj loĝis en la sama hotelo kiel delegitoj el Ho Chi Minh-urbo. Ekde tiam ŝi regule vizitis Vjetnamion kaj instruis plurfoje en Ho Chi Minh-urbo kaj Hanojo. Pasintan oktobron ŝi eĉ instruis al studentoj kiuj helpos dum la ĉi-jara Universala Kongreso. Ŝi ankaŭ provlegis la tagkajerojn eldonitajn pasintan jaron de juna kuracisto kiu mortis en la ĝangalo dum la milito kontraŭ Usono. Franciska ĉiam pretas helpi esperantistojn en Vjetnamio kiuj montras multan entuziasmon. Kelkfoje ŝi instruis en la Domo de Paco, asocio kiu havas rilaton kun aliaj landoj cele pacon. Nun ŝi ricevis medalon de la Vjetnama Asocio pri Paco kiu donis medalojn al kelkaj esperantistoj kiuj kontribuis al kreo de pacaj rilatoj kun Vjetnamio. Gratulon al Franciska!



Franciska Toubale

Memore pri Audrey

Bob Felby

Audrey naskiĝis en Londono la 1-an de novembro 1935. Mi la unuan fojon renkontis ŝin en la aŭtuno 1956. Ni iris kune al Kopenhago, sed restis nur kelkajn monatojn, ĉar ni reiris al Anglujo. En Anglujo mi rajtis labori nur en la kamparo, malsanulejoj, kaj minejoj. Kiel la saĝulo kiu mi ja estas, mi elektis labori en la kamparo kie la aero estas, aŭ almenaŭ devus esti, iomete pli freŝa ol en Londono.

Ses longajn jarojn ni do restis en Anglujo. Kelkfoje mi ŝanĝis mian laboron, sed preskaŭ ĉiam al alia kokinejo. Unu fojon mi laboris en bildkadrofabriko, sed ankaŭ tiu situis en la kamparo.

Audrey naskis al mi, kaj al si, du bonajn knabojn. La unua nomiĝis tiam Marko Anglo, la alia Allan. Poste Marko Anglo, kiun multaj el vi jam konas, ricevis la nomon Mahabuddhi. Allan nun loĝas en la kamparo bredante ekzotajn birdojn, sed ankaŭ ordinarajn gekokojn.

Sed ni devus ja paroli pri Audrey, ĉu ne? Ŝi multajn jarojn laboris en Kopenhago kaj ĉirkaŭaĵo. Unu el ŝiaj bonaj laboroj estis laboradi en ĉokoladfabriko. De tempo al tempo ŝi rajtis hejmenporti multe da ĉokolado sufiĉa por la tuta familio kaj niaj najbaroj.

En 1964 naskiĝis nia unuanura filino Linda. Ŝi naskiĝis en Glostrup, antaŭurbo de Kopenhago. Ŝi ne plu estas la eta Linda kiun ni subite havis, sed ŝi tamen estas nia eta filino, kaj ŝi ankoraŭ nomiĝas Linda!

En aprilo 1974 ni ĉiuj elmigris al Adelajdo. Tie ni loĝis preskaŭ unu tutan jaron en ladskatolo en Pennington Hostel. Poste ni loĝis en Salisbury East, tiam en Athol Park, kaj fine en Semaphore Park, kie la vivo estas bona.

Kune kun mi Audrey en 1995 partoprenis la Universalan Kongreson en Tampereo, Finnlando. Poste ni vizitis nian familion en Danujo. Ni iris ankaŭ al Svedujo kaj Norvegujo. Iom poste ni vizitis Berlinon, Amsterdamon, Roterdamon kaj Parizon. De Parizo

Audrey Felby



ni iris per la nova tunelo al Londono por viziti la ceteran familion en Anglujo. Dum ni estis tie, ni turistumis iomete ankaŭ en Skotlando. Do, almenaŭ tiom da ĝojo Audrey renkontis en sia vivo.

Tiam alvenis al ni tio kion ni pleje timis. Audrey forlasis ĉi tiun materian mondon post 49 tagoj da malsano en malsanulejo! Nun ŝia hejmo estas tie kien ankaŭ ni iam iros, ĉu ne? Mi sincere esperas ke mi sukcesis doni al ŝi tiom da ĝojo, kiom ŝi ja meritas.

En la nomo de mia kara edzino Audrey, kiel ankaŭ de tiu de mia cetera familio, mi dankas vin ĉiujn pro viaj kortuŝaj kondolencoj kaj sinceraj esprimoj esprimitaj okaze de ŝia, laŭ mi, tro frua forpaso. En la komenco mi estis tute senespera. Fakte mi ne sciis kion fari, sed mia pliaĝa filo, Mahabuddhi, venis el Brisbano por subteni min. Tio estis tre granda donaco por mi. Sen li mi verŝajne estus nerve detruita. Sed nun ĉio estas en tre bona ordo, ĉu ne?


Gratulinda veterano

Trevor Steele

En 1974 Bob Felby venis al Aŭstralio kun sia edzino Audrey kaj la tri gefiloj Mark, Alan, kaj Linda. La geedza paro loĝis dumtempe en Anglio, poste Danlando, kaj fine Aŭstralio: dume ili havis do tri komunajn lingvojn – la anglan, la danan, kaj Esperanton.

Tuj post alveno en Adelajdo ges-roj Felby iĝis tre aktivaj membroj de la malgranda loka E-grupo. Bob

Bob Felby en drama humoro kaj la aliaj atente aŭskultas en la teatraĵo, "La Lasta Kunsido", verkita de Trevor Steele.



estis jam unu el la plej elstaraj esperantistoj de Aŭstralio, eble de la mondo. Dum tre multaj jaroj li verkas la bultenon *Tamen plu,* kies lingvonivelo estas prifierinda. La paro disponigis sian domon por gardi la bibliotekon de la adelajda grupo, kaj ili aktivis ankaŭ en la landa movado.

Fakte, Bob kaj Audrey estis dum multaj jaroj la forta kaj fidinda kolono de la movado en Sud-Aŭstralio. Je ĉies malĝojo Audrey mortis ĉi-jare en junio, sed Bob daŭrigos sian bonan laboron por Esperanto. Li kapable ludas diversajn muzikinstrumentojn kaj daŭre kunportas al kunsidoj kantarojn, kiuj ebligas ke la adelajda grupo daŭre ĝuu kunkanti.

Se mi rajtas aldoni personan noton: kiam mi verkas romanon, mi petas Bob kontroli ĝian lingvon. Se li aprobas la tekston, mi povas fidi ke ne restas multaj eraroj. La 11-an de julio 2012 Bob fariĝis 80-jara, sed li restas multrilate daŭre juna kaj energia.

Venonta Kongreso en Auckland

Pliaj detaloj pri la kongreso de NZEA aperas en la retpaĝo (esperanto.org.nz). Intertempe, Se vi volas mendi flugojn, alvenu en Auckland la matenon de la 10-a de januaro. La kongreso finiĝos la posttagmezon de la 16-a de januaro. Ne estas problemo pri loĝado kaj hoteloj ĉar eblas mendi dormĉambron en la kongresejo mem. Ni bonŝancas ĉar Grazina Opulskiene, elstara esperantistino el Litovio, prelegos kaj gvidos kursojn dum la kongreso.

Eventoj ĉe la Esperanto-kastelo en Greziljono, Francio

Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj

Kursoj, koncertoj, muzikado, mantro, promenado, ludoj, kaj aliaj aktivaĵoj laŭ via elekto

Specialaj gastoj: Svetlana Smetanina el Moskvo kaj Kees Ruig el Nederlando

De sabato, 27-a de oktobro ĝis sabato, 3-a de novembro 2012, en la fama **kastelo Greziljono**, franca kulturdomo de Esperanto

Detalaj informoj en reto:

www.gresillon.org/autune

Kontakto: kastelo@gresillon.org

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President
Bradley.m@woosh.co.nz

Chris Krägeloh | Vice-President
chris.krageloh@gmail.com

David Ryan | Treasurer
ryangomez@xtra.co.nz

Howard Gravatt | Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erinmcgifford@hotmail.com

Vicky Crickett | Committee Member
vcrickett@gmail.com

Ivan Pivac | Committee Member
ivan@zabonne.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the

Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
www.oceana-esperanto.weebly.com
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President
prezidanto@esperanto.org.au

Kam Lee | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Indrani Beharry-Lall | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Heather Heldzingen | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Margaret Chaldecott | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au

Gordon Coleman | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

Max Wearing | Director of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.





